

Zábavná esperantská hodina  
Amuza esperanta horo

1. Úvod a konference. Enkondukon kaj konferencon. Th. Kilian
2. Esperantská hymna. Esperanta himno (gramofona disko)
3. Dombrowský: Nova kanto  
Dr. Stan. Schulhof: Verda stelo. Recituje – recitas Ivan Blatný
4. Národní písně moravské v esperantském překladu. Moraviaj naciaj  
kantoj en esperanta traduko. Zpívá sl. - kantas f-ino Zd. Trdá
5. Činohra – unuakta ludo  
Ignát Herrmann: Malíř a fiakrista – La pentristo kaj fiakristo.  
Scéna ze soudní síně – sceno el la juĝejo

O s o b y - p e r s o n o j

- |                            |                    |
|----------------------------|--------------------|
| Soudce – juĝisto T. N.     | T. Kilian          |
| Zapisovatel – protokolisto | MUC Bedřich Freund |
| Pan Slabihoudek            |                    |
| Pan Kalivoda               | Jiří Šamla         |
| Advokát – advokato         | MUC Bedřich Freund |
6. Voskovec – Werich: Chyby – eraroj. Gramof. Deska – gramofona disko.  
Vlasta Burian: Slavnostní řeči. " " " "
  7. Dr. Stan. Schulhof: Ho ve, koro disŝirita! Recituje – recitas M. Šmardová
  8. Rozhovor II. Mezinárodní letoviště v Bělohradě (dialogo)  
Pri internacia libertempejo en Lázně Bělohrad. Red. Marie Strejčková a Jiří Šamla
  9. J. Suk: V nový život (pochod – marŝo)  
~~Jul. Fučík: Florentinský pochod – Florentina marŝo.~~
  10. Československé hymny – ĉeĥoslovakaj himnoj

## RADIOJOURNAL BRNO,

### AMUZA

1. de marto 1933, ESPERANTA VESPERO, 10. 15-11. 15, MET

#### 1. Enkonduko.

Amikoj en ĉiuj landoj, samideanoj dissemitaj tra tuta Eŭropo kaj apudaj kontinentoj, al vi ĉiuj mi deziras, per ondo etera, fluganta trans montarojn kaj marojn, agrablan, bonan vesperon.

Permesu, ke mi prezentu min al vi: mia nomo estas Theodoro Kiliano. Kiel vi aŭdas, ĝi sonas tute esperante, sed tamen ĝi ne estas pseŭdonimo. Mi sole prunteprenis la esperantan finiĝon laŭ la konata modelo: Frideriko Ŝillero. Vi do ĉiuj konsentos, ke jam per mia nomo mi estis predestinita al esperanto kaj pro tio vi certe ne miros, se mi diros ke, ricevinte la zamenhofan, rusan lernolibron el la jaro okdeksepa, mi fariĝis tiel fervora, jes furioza esperantano, studanta tage kaj nokte, ke miaj plej bonaj amikoj deklaris, ke mi freneziĝis. Ho, amikoj, mi ne dubas, ke ankaŭ vi spertis ĉi tiun specialan, esperantan febron. Mia amiko eĉ asertis ke nur tiu restos esperantisto ĝis morto, kiu ĝin spertis. Jam post tri semajnoj mi opiniis min perfekta esperantisto, malfermis samtempe tri senpagajn kursojn, fervorege ekpropagandis nian karan lingvon, fondis gazeton la "Semanto" kaj skribis artikolojn. Se miaj tiamaj lernantoj kaj legantoj sidas hazarde ĉe siaj riceviloj, aŭskultante mian konfeson — mi pente petas ilian pardonon. Specialan pardonpeton mi direktas al amiko Matzke en Aŭstrujo kaj amikoj Némethy kaj Kelemen en Hungarujo; ili estis bedaŭrindaj kunredaktoroj. Jes, mi forgesis diri, ke tio estis dum la mondmilito. Mi sidis kiel militkaptito kun du mil aliaj oficiroj en azia urbo Tomsk, la koro de centra Siberio. Kaj nun, saltinte trans dekkvin jaroj kaj miloj da kilometroj, mi staras antaŭ la mikrofono, la moderna miraklo de nia epoko kaj parolas al esperantistoj de la tuta Eŭropo kaj ĉirkaŭaĵo. Jes, ĉirkaŭaĵo, ĉar s-ro Tadros Migalli en Egiptujo kaj samideano Ĥitin en Siberio aŭskultas nian hodiaŭan vesperon. Nia estiminda panjo Tero fariĝis malgranda kiel sulkiĝinta virineto post okdekjara vivo. En mia plej arda esperanta febro mi ne povis esperi la alvenon de tiu ĉi tago. Tiame servis la radio nur al la morton portanta milito, hodiaŭ ankaŭ al ni, pacaj batalantoj, por nia kultura movado.

Geamikoj, nia hodiaŭa tuthora dissendo estas la frukto de via afabla kunlaboro. Via estas la merito, via estas la sukceso. La direkcio de nia radio-stacio, ricevinte post mia parolado pri niaj vidindaĵoj okdek poŝtkartojn el deknaŭ ŝtatoj de Eŭropo kaj unu eĉ el centra Siberio, konvinkiĝis pri la graveco kaj vasteco de nia movado kaj afable konsentis tuthoran dissendon por ĉiu monato. Al vi, Kavaliroj de la verda stelo, mi dankas por via montrita intereso kaj permesu, ke mi tutkore danku en via nomo al la sinjoroj direktoro kaj sekretario de nia stacio, por ilia ĝisnuna eksterordinara favoro. Montrinte al vi la gravecon de via afabla kunlaboro, mi denove kuraĝas peti vin, ke vi skribu tuj hodiaŭ. Amikoj, ne kontentiĝu per duvorta gratulo, sed kritiku, sciigu viajn dezirojn kaj sugestojn, ĉar la direktoro de nia stacio bone komprenas esperanton kaj tre atente lega ĉiun poŝtkarton. Se vi raportos en naciaj gazetoj, sendu ĝin kun esperanta traduko. Ĉiu, kiu skribos, ricevos ilustritan gvidlibron kun 11 geografiaj kartoj kaj centkvardek bildoj. Sed vi devas speciale peti ĝin. Instruistoj kaj vizitantoj de la dudeksepa Universala Kongreso en Praha, por vi ĝi estos speciale valora. Tiu ĉi propono validas nur por eksterlandanoj, kiuj petos la gvidlibron dum la unua semajno post nia dissendo. Ni estas feliĉaj, ke ni povas servi vin. Ebligu al ni la servon. Neniu direktoro, eĉ se li mem estus esperantisto, kuraĝus daŭre dissendigi esperantajn programerojn, se la esperanta mondo restus surda kaj muta. Tion ĉi ni bone konsciu. Kaj kiam nia voĉo estos sufiĉe potenca, ni ricevos ankaŭ parolantan filmon.

#### 2. Esperanta hinno. (gram. Disko.)

Estimataj geaŭskultantoj, nian vesperon ni komencu laŭ malnova tradicio per esperanta himno.

### 3. Dombrowsky: Nova kanto.

Dr. Stanislav Schulhof : Verda stelo.

Gesinjoroj, imagu inteligentan studenteton dekdujaran. Tia estas Ivan Blatný, kiu nun recitas poemon de Dombrowsky: Nova kanto. Nun sekvos poemo Verda stelo de d-ro Stanislav Schulhof, kiu estis persona amiko de nia Majstro kaj unu el la plej unuaj pioniroj en Bohemujo. Verda stelo. Longe antaŭ la milito kovriĝis la ĉielo de Esperantujo per minacantaj nuboj. Sinceraj esperantistoj ektimis pri la sorto de l' verda stelo. Nia poemo, jen la krio de l' espero, el tiu tempo de l' danĝero. Sed denove leviĝas nigraj nuboj. Amikoj, ni ĉiuj, soldatoj kaj generaloj, montru bonvolon kaj la ĉielo denove sereniĝos, denove brilos la benita suno, kiu maturigos la plej dolĉan frukton: la gloran venkon de nia alta ideo. II. Poemo.

### 4. Moraviaj popoloj kantoj en esperanta traduko.

Oni diras, ke en Salzburg, kie pluvos ĉiun tagon, la infanoj naskiĝas kun pluvombrelo, kaj en Bohemujo kun violono. Ĉi tiu amo al muziko montriĝas ĉe la popolo ankaŭ per kantemo. Do estas nature, ke nia popolo povas fieri pri senfina vico da belegaj popolaj kantoj ankoraŭ vivantaj. Nun vi aŭdos du en esperanta traduko, kiujn kantas fraŭlino Zdenka Trdá.

### 5. Unuakta ludo: La pentristo kaj fiakristo, sceno el la juĝejo de Ignát Herrmann.

Atentaj legantoj de Heroldo certe legis la kritikon de s-ro M. Butin pri la rakonto Fokso kaj Nukso de Ignát Herrmann. Permesu al mi citi kelkajn frazojn el tiu kritiko. Jen: Kontraŭe al banalaj spritaĵoj fabrikaĉitaj, nia rakonto vidigas multan spiriton en la trafa desegnado de tipaj karakteroj. Mi dankas al tiu majstra verketo tre amuze kontentigan vesperon. Kelkfoja ridado estas nepre necesa en nia glora tempo de l'krizoj. "Gesinjoroj, nun vi aŭdos unuaktan ludon de la sama aŭtoro. Lin interesas la vivo, la ĝojo kaj doloro de l' neniue atentita viro el la popolo. Do, ne miru aŭdante iom tro fortajn esprimojn. Lia humoro jam iom malmoderniĝis, ĝi estas, permesu la esprimon, antaŭmilita. Tamen estas Ignát Herrmann unu el la plej legataj ĉeĥaj verkistoj. La titolo de nia teatraĵeto estas: La pentristo kaj la fiakristo, kaj montras scenon el juĝejo. La personoj estas:

La protokoliston prezentas .....	Fr. Weigl
la juĝiston .....	Bedř. Freund
s-ron Slabihoudek, fiakristo ...	Fr. Válka
s-ron Kalivoda, pentristo .....	Jiří Šamla
la advokaton .....	Fr. Veigl
Reĝisoro s-ro .....	Jos. Bezdíček
esperanten tradukis Theodor Kilian.	

Ni komencas.

### 6. Voskovec kaj Werich: Senerara homo rara

Tute specialan lokon en nia teatra vivo okupas "La liberigita teatro" en Praha. Voskovec kaj Werich, la fondintoj, estas intelektaj klaŭnoj, arlekenoj, burleskuloj, ĵonglantaj per vortoj kaj ideoj, ŝajne logikaj konkludoj kaj vortludoj. Ili estas verkistoj de la ludataj teatraĵoj, aktoroj, reĝisoroj, ĉio en unu, pardonu en du personoj. Neniu aktoro de la liberigita teatro estas pli aĝa ol dudekkvin jaroj. Ili ridindigas kaj vipas la nuntempan socian vivon. Ilia sola celo estas: ridigi la publikon kaj ni devas konfesi, ili majstre sukcesas. Rimarkinda estas ilia rapidega sed tamen klarega parolmaniero. Jen ekzemplo, konvinkiĝu. La nomo de la disko: Per eraroj oni lernas. I. disko.

La muzikestro de la liberigita teatro estas s-ro Ježek, talentita, modernakomponisto. Nun vi aŭdos lian konatan Bugati-step. II. disko.

Mi esperas, ke ĝi plaĉis al vi. Aŭskultu nun la Solenajn paroladojn de Vlasta Burian, nia plej bona komikisto. Ĉu vi vidis la filmon Ĉefmarŝalo? Jes? Tiam vi konas lin. Do atendu nenion seriozan. Burian estas bonega imitanto. Vi aŭdos solenajn paroladojn en ses diversaj lingvoj, sed eĉ la anoj de la koncernaj nacioj komprenos nenion. Li nur imitas la elparoladon, la ritmon kaj la muzikon de la lingvoj. Ĉu vi rekonos vina lingvon? Bone atentu! La nomo de la disko: Solenaj paroladoj.

### III. disko.

Nuligita versio:

#### 6. Voskovec kaj Werich: eraroj.

Tute specialan lokon en nia teatra vivo okupas "La liberigita teatro" en Praha. Voskovec kaj Werich, la fondintoj, estas nestudentaj studentoj-universitatoj. Ili estas verkistoj de la ludataj teatraĵoj, aktoroj, reĝisoroj, ĉio en unu, pardonu en du personoj. Neniu aktoro de la liberigita teatro estas pli aĝa ol dudekkvin jaroj. Ili ridindigas kaj vipas la nuntempan socian vivon. Ilia sola celo: ridigi la publikon kaj ni devas konfesi, ili majstre sukcesas. Rimarkinda estas ilia rapidega sed tamen klarega parolmaniero. Ilia muzikestro, s-ro Ježek, estas tre talentita junulo: Jen ekzemplo, konvinkiĝu. La dua disko estas Solenaj paroladoj de Vlasta Burian, nia plej bona komikisto. Ĉu vi vidis la filmon ĉefmarŝalo? Jes, tiam vi konas lin. Do atendu nenion seriozan. Burian estas bonega imitanto. Nekonata lingvo impresas nin per sia elparolado, per sia ritmo kaj muziko. Ilin imitas Burian en siaj solenaj paroladoj.

Atentu ....., tiel ni aŭdas vin!

#### 7. Dr. Stanislav Schulhof: Ho ve, koro disŝirita.

De la jam nomita d-ro Schulhof vi aŭdos nun poemon: Ho ve, koro disŝirita, poemo, kiun oni emas aŭskulti plej volonte el la buŝo de bela fraŭlino. Recitas fraŭlino Šmardová.

#### 8. II. Internacia libertempejo en Bělohrad.

Ju pli vasta estas nia movado, des pli forta la deziro libertempi en la mezo de esperantistoj, farante unu rondon familian. Kie vi trovos ĉi tiun rondon, tion vi sciiĝos el la dialogo de nia senlaca samideanino, sinjorino Strejčková kun sinjoro Jiří Šamla.

Ĉiu, kiu interesiĝas pri la dua Internacia Libertempejo en Lázně Bělohrad, skribu al Radiojournal, Brno, kaj li ricevos senpage 20 paĝan, ilustritan broŝureton, en kiu li sciiĝos ĉion bezonan. Sed vi devas speciale peti ĝin.

#### 9. Josef Suk: En novan vivon, marŝo.

En la pasinta somero la okuloj de la tuta mondo estis direktitaj al Los Angeles, la urbo de la olimpaj ludoj, En nia sporton ŝatanta tempo la plej vivan intereson vekis la sportistoj, Sed la olimpaj ludoj respegulas ne nur la korpan, sed ankaŭ la artan niveloj de la popoloj. En ambaŭ konkursoj la reprezentantoj de la ĉeĥoslovaka popolo povas fieri pri bona sukceso. La sportistoj gajnis unu oran, unu arĝentan kaj du bronzaĵajn medalojn. Krom tio nia komponisto Josef Suk kaj skulptisto Jakub Obrovský estis distingitaj per arĝenta medalo. Suk, lernanto kaj bofilo de la fame konata ĉeĥa komponisto Dvořák, estas konata al vi, el radio. Li estas ano de la majstra ĉeĥa kvarteto. La marŝo, distingita per arĝenta medalo en la olimpaj ludoj, havas la titolon: En novan vivon. Do, marŝo kvazaŭ esperanta kaj estis komponata speciale por la pasintjara tutsokola kongreso. Ek en la novan vivon!

nuligita versio:

Li estas ano de la majstra ĉeĥa kvarteto. Atente legu la ĉeĥoslovakian programon kaj vi povos ĝui ĉi tiun unikan kvaron. La distingita marŝo havas la titolon: en novan vivon. Do, marŝo kvazaŭ esperanta. Ek en la novan vivon!

#### 10. Ĉeĥoslovakaj himnoj.

Nian vesperon ni finas per la ĉeĥoslovakaj himnoj.

Fina vorto: Sinjorinoj kaj sinjoroj, ni esperas, ke nia amika vespero plaĉis al vi kaj ĝojas je multvoĉa eĥo el ĉiuj anguloj de Eŭropo.

Ni dankas por via atento kaj deziras al vi ĉiuj feliĉan, bonan nokton.

Atentu, nia stacio elsendos la sesan paroladon pri T.S. Masaryk.

Komenco: De dudek – dudek kvinminutoj

Krom tio elsendos nia stacio ĉiusabate regulajn paroladojn. Komenco: Dek minutoj antaŭ la sesa vespere.

Sinjorinoj kaj sinjoroj, ni esperas, ke nia amika vespero plaĉis al vi kaj ni ĝojas je multvoĉa eĥo el ĉiuj anguloj de Eŭropo kaj ekstereŭropo. . . Montrinte vin la gravecon de via afabla kunlaboro, mi denove kuraĝas peti vin, ke vi skribu tuj, hodiaŭ vespere. Amikoj, ne kontentiĝu per duvorta gratulo, sed kritiku, sciigu viajn dezirojn kaj sugestojn, ĉar la direktoro de nia stacio bone komprenas esperanton kaj tre atente legas ĉiun leteron kaj poŝtkarton. Se vi raportos en naciaj gazetoj, sendu unu ekzempleron kun esperanta traduko. Ĉiu, kiu skribos, ricevos ilustritan gvidlibron kun dekunu geografiaj kartoj kaj centkvardek bildoj. Sed vi devas speciale peti ĝin. Instruistoj, por vi ĝi estos bona informilo! Speciale valora ĝi estos por la vizitontoj de la dudeksepa Universala Kongreso en Praha. Sed atentu: tiu ĉi propono validas nur por eksterlandanoj, kiuj petos la gvidlibron dum la unua semajno post nia dissendo. Amikoj! Ni estas feliĉaj, ke ni povas servi vin. Ebligu al ni la servon. Neniu direktoro, eĉ se li mem estus esperantisto, kuraĝus daŭre dissendigi esperantajn programerojn, se la esperanta mondo restus surda kaj muta. Tion ĉi bone konsciui! Gesinjoroj, ni dankas por via atento kaj deziras al vi ĉiuj feliĉan, bonan nokton.

Nian vesperon ni finas per la ĉeĥoslovakaj himnoj.

Himnoj.

Nia stacio elsendos la sesan de tiu ĉi monato, tio estas lunde, paroladon pri nia prezidento T. G. Masaryk. Tempo: Dudekdu-dek kvin minutoj ĝis dudekdu-tridek minutoj.

Krom tio ni elsendos ĉiusabate regulajn esperantajn paroladojn.

Tempo: Dek minutoj antaŭ la dekoka ĝis la dekoka horo.

Halo, Radiojournal, Brno ... 22 ŝtatoj de Eŭropo kaj Afriko aŭskultis nian stacion!

Lavango da aprobaj kaj dankaj leteroj amasiĝis sur la skribotablo de la direkcio de RJ en Brno. Jen ĝojiga rezulto de nia unua Amuza Horo. Venis leteroj el 22 ŝtatoj eŭropaj kaj afrikaj kun tre interesa kaj instiga enhavo.

La komuna celo de ĉiuj parolantoj dum la amuza horo kaj dum la apartaj paroladoj estis, paroli bonan kaj klaran esperanton kaj vekti la intereson de la atingebla esperantistaro por nia stacio. Kun ĝojo ni povas konstati, ke ni sukcesis. Jen, kiel skribis norvega instruistino;

"Kio estas nova en Brno?" estas mia unua demando, kiam la leterportisto enmanigas al mi la semajnan radioĵurnalon. "Ĝuste tiu ĉi scivolemo estis la celo de konscienca, tutjara laboro de ĉiuj kunlaborantoj.

Per sia morala unuanima subteno la esperantistaro manifestis firman unuecon kaj fortan volon atingi en gloro la celon. Skribis esperantistoj el ŝtatoj reorganizemaj kaj konservativaj, skribis esperantistoj neŭtralaj kaj klasbatalanoj. Ili ĉiuj faras unu rondon familian, ili ĉiuj estas unuavice esperantistoj, se temas praktike helpi al la movado. Ĝojiga fakto pripensinda de niaj generaloj.

Rimarkinda estas la nombro da leteroj venintaj el Francujo. Ĝi estas la frukto de mirinda organiza talento kaj modela laboro de s-ro inĝ-ro Ed. Houzé, al kiu ni ŝuldas nian koran dankon. Saman dankon ni ŝuldas al s-ro Joh. Jungfer, la reprezentanto de Internacia Radio-Servo.

Multaj samideanoj uzis nian amuzan horon por efika propagando en rondoj neesperantistaj. Precipe ĝojiga estis la letero de s-ro Leone Costantini, oficisto de Banco di Milano, kiu aranĝis komunan aŭskulton por siaj kolegoj – duoncento - esperantistoj kaj neesperantistoj. Tiamaniere konvinkiĝas pri la praktikaj avantaĝoj de espo eĉ la centprocentaj mokemuloj.

Speciale valoraj estis por ni la plej diversaj instigoj kaj proponoj. Ili klare montris al ni, kiujn programerojn preferas nia internacia aŭskultantaro; bonega gvidilo ce l'kunmetado de niaj estontaj programoj.

Unu proponon mi deziras speciale menvii. Ĝi venis el Milano de s-ro D-ro F. Buglione Di Monale, kiu proponis al radio-stacio en Brno kunlaboron kun radio-stacio en Milano. Brno plezure akceptis kaj proponis reciprokan interianĝadon de espaj programoj. Kiel decidiĝas Milano? Ne necesas troa fantazie, por klare vidi, kien celas en siaj konsekvencoj la efektivigo de tiu ĉi ideo.

Statistiko de l' alvenintaj leteroj:

<u>Eŭropo:</u>	1. Francujo .....	89
	2. ĈSR .....	21
	3. Svedujo .....	20
	4. Danlando .....	20
	5. Aŭstrujo .....	16
	6. Norvegujo .....	11
	7. Italujo .....	10
	8. Germanujo .....	9
	9. Nederlando .....	7
	10. Belgujo .....	5
	11. Jugoslavujo ....	5
	12. Estonujo .....	3
	13. Hungarujo .....	3
	14. Hispanujo .....	3
	15. Anglujo .....	2
	16. Polujo .....	2
	17. Litovujo .....	1
	18. Latvujo .....	1
	19. Rumanujo .....	1
	-----	
		229

<u>Afriko:</u>	1. Alĝerio .....	1
	2. Egiptujo .....	1
	-----	
		2

Eŭropo kaj Afriko kune: 231 leteroj el 22 ŝtatoj.

Al ĉiuj skribintoj nian sinceran dankon!

T.K.